S. Ó Riain, Ein englischsprachiges Europa, Verein für deutsche Sprache, 2004

L. Áron, Die wirtschaftlichen Auswirkungen der sprachlichen Ungleichheit, College for Modern Business Studies, Tatabánya, Hungario, 2007- http://www.ekolingvo.com

W. Günther, Interna ideo, homaj rajtoj kaj ekologia perspektivo, Scienca Revuo, vol 60 (2), n-ro 217, p. 72, 2009

www.verduloj.org (Asocio de Verduloj Esperantistaj, Esperanto & Ekologio) Sprachrechte. Déclaracion Universelle des Droits Linguistiques, Barcelona, 1996

H. Erasmus, Das Sprachenproblem in Europa, http://www.lingviko.net/db/06_Erasmus.htm

Übersetzung von Europa-Dokumenten, http://www.adatrad.com/blog/uebersetzung-von-eu-dokumenten/

Abschlussdokument der Konferenz "Die Zukunft der europäischen Mehrsprachigkeit in einer erweiterten Europäischen Union", interreto UN. United Nations Millennium Declaration 55.2, 2000

W. Sachs, Abschied vom Aufholen, forum 188, 1998

W. Sachs, Ohne Ökologie keine Menschenrechte. Welche Globalisierung ist zukunftsfähig?, Wuppertal Papers Nr. 131, 2003

W. Sachs, Ohne Ökologie keine transnationale Gerechtigkeit, Polis 1, 2004

D. Brocchi, The Cultural Dimension of Sustainability, Institut Cultura21 e.V., Köln, 2007

D.L. Loy, Die Religion des Marktes, http://www.buddhanetz.org/texte/marktreligion.htm

R. Sperry, Naturwissenschaft & Wertentscheidung, Piper, ISBN 3 492 02937 x

B. Köhler, Die Evolution in Natur & Gesellschaft – wohin führt sie uns?, http://www.bertramkoehler.de/vortragBuch.htm

N. Einhorn, Den Wandel wollen http://www.zist.de/arbeit/inhalt_art_einhorn.html

UEA, Manifesto de Prago, 1996 www.uea.org (Universala Esperanto-Asocio)

Adreso de la aŭtoro
Dr. Wolfgang GÜNTHER
Ap 270
ES – 03170 – R o j a l e s (Alicante)
HISPANUJO
<w.guenther.esperanto@web.de>

Priaŭtora informo

Tiu ĉi teksto de "advokato de konsekvenca prevent-medicino kaj prevent-ekologio", estis verkita por GEK/EEK 2009 en *Herzberg*, Germanujo, kaj prelege realigita dum la 68-a Hispana Kongreso de Esperanto en *Malaga*, Hispanujo 2009.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– La angla kaj rusa komparacioj –

Gerald TUCKER

Ankaŭ en la angla ekzistas la triŝtupa komparacio. Kvankam ĝi estas baze ĝermana lingvo tre proksime parenca kun la germana, ĝi krome estas, kiel Esperanto, leksike miksa lingvo ĝermana-latinida. La angla, tamen, estas ankaŭ struktura miksaĵo kaj havas kaj ĝermanan kaj latinidan komparaciojn. Laŭ certaj kriterioj unuj komparaciiĝas ĝermane, aliaj latinidaj kaj kelkaj ambaŭe. Ankaŭ la angla permesas al si aron da kontraŭsistemaj formoj.

La ĝermana komparacio

La bazo de la ĝermana komparacio estas, simile kiel en la germana, fleksioj: komparativa **-er** kaj superlativa **-est**.

Ĝermane komparaciiĝas:

2. ĉiuj unusilabaj adjektivoj:

pozitivo	komparativo	superlativo
clean [kli:n] "pura"	*cleaner*	*cleanest*
new [nju:] "nova"	*newer*	*newest*
cheap [ĉi:p] "malkara"	*cheaper*	*cheapest*

3. dusilabaj adjektivoj kun jenaj finaĵoj:

2.1. –y

pozitivo	komparativo	superlativo
dirty ['də:ti] "malpura"	*dirtier*	*dirtiest*
easy ['i:zi] "facila"	*easier*	*easiest*
happy ['hæpi] "feliĉa	*happier*	*happiest*
pretty ['priti] "beleta"	*prettier*	*prettiest*
Sed: *shy* [ŝaj] "timida"	*shyer*	*shyest*

Ĉi tiu regulo validas, kiam la litero antaŭ **–y** estas konsonanta. Post vokala **–y** ĉi tiu ne ŝanĝiĝas.

1.1. –er

pozitivo	komparativo	superlativo
clever ['klevə] "ruza"	*cleverer*	*cleverest*

1.2. –le

pozitivo	komparativo	superlativo
simple ['simpəl] "simpla"	*simpler*	*simplest*

1.3. –ow

pozitivo	komparativo	superlativo
narrow ['nero] "streta"	*narrower*	*narrowest*

1.4. –e

pozitivo	komparativo	superlativo
large [la:ĝ] "granda"	*larger*	*largest*

Muta e fandiĝas kun la e de la finaĵo; restas nur unu e.

1.5. Ĉe unusilabaj adjektivoj kun "mallonga" vokalo kaj nur unu finkonsonanto la konsonanto duobliĝas:

pozitivo	komparativo	superlativo
big "granda"	*bigger*	*biggest*
sad [sæd] "malĝoja"	*sadder*	*saddest*

Latinide komparaciiĝas

1. ĉiuj plursilabaj adjektivoj (escepte de kelkaj dusilabaj – vd. supre)

pozitivo	komparativo	superlativo
difficult ['difikəlt] "malfacila"	***more** difficult*	***most** difficult*

Do, ***more*** (e muta) = "**pli**" kaj ***most*** [moŭst] = "**plej**".

2. Ĉe kelkaj adjektivoj eblas kaj la ĝermana kaj la latinida komparacio:

pozitivo	komparativo	superlativo
common ['kʌmən] "ofta, ordinara"	*commoner / **more** common*	*commonest / **most** common*
likely ['lajkli] "kredebla"	*like**lier** / **more** likely*	*like**liest** / **most** likely*
pleasant ['plezənt] "agrabla"	*pleasan**ter** / **more** pleasant*	*pleasan**test** / **most** pleasant*
polite [pə'lajt] "ĝentila"	*polite**r** / **more** polite*	*polite**st** / **most** polite*
simple ['simpəl] "simpla"	*simple**r** / **more** simple*	*simple**st** / **most** simple*
stupid ['stjupid] "stulta"	*stupide**r** /**more** stupid*	*stupide**st** / **most** stupid*
subtle ['sʌtəl] "subtila"	*subtle**r** / **more** subtle*	*subtle**st** / **most** subtle*
sure ['ŝuə] "certa"	*sure**r** / **more** sure*	*sure**st** / **most** sure*

3. Ankaŭ la angla havas siajn kontraŭsistemajn komparaciajn formojn:

pozitivo	komparativo	superlativo
good [gud] "bona"	***better***	***best***
bad [bæd] "malbona"	***worse*** [ŭə:s]	***worst*** [ŭə:st]
much [mʌĉ] "multa"	***more*** [mɔ:]	***most*** [moŭst]
many ['meni] "multaj"	***more*** [mɔ:]	***most*** [moŭst]
a lot of [ə 'lɔt əv] "multa(j)"	***more*** [mɔ:]	***most*** [moŭst]
little ['litəl] "malmulta(j)"	***less***	***least*** [li:st]
little ['litəl] "malgrandaj"	***littler** / **smaller*** ['smɔlə]	***littlest** / **smallest*** ['smɔlist]

4. Kvaro da adjektivoj havas pro semantikaj kaŭzoj du komparaciojn, jen laŭssistemajn, jen kontraŭsistemajn:

pozitivo	komparativo	superlativo	rimarkoj
far "malproksima"	***farther*** ['fa:ðə]	***farthest*** ['fa:ðist]	malproksimeco
	further ['fə:ðə]	***furthest*** ['fə:ðist]	plua/pleja
late [lejt] "malfrua"	*later*	*latest*	posta/plej nova
	latter ['lætə]		lastmenciita
		last	lasta
old [oŭld]	*older*	*oldest*	maljuna
	elder	*eldest*	familie pliaĝa
near ['niə] "proksima"	*nearer*	*nearest*	distanco
		next	posta/neksta/venonta

Por lerni la anglan komparacion bezoniĝas 4 bazaj elementoj, 13 kontraŭ-sistemaj kaj 6 subsistemaj elementoj. Krome la angla uzas du komparaciajn sistemojn. 8 adjektivoj uzas ambaŭ sistemojn. 4 pluaj havas duoblajn komparaciojn. (35 elementoj)

Fontoj:
Quirk & Greenbaum: A University Grammar of English, Longman, London, 1973, p. 130-137.

La rusa komparacio

La rusa apartenas, kiel la aliaj lingvoj de la studo, al la idiomoj kun triŝtupa komparacio. Ĉe la komparativoj necesas okupiĝi pri du variantoj: la "kunmetita" (analiza) formo kaj la "simpla" (fleksia) formo.

La "kunmetita" komparacio

La "kunmetita" komparativo aplikas la vorton "**более**" ['boljije] = "**pli**". Simile la superlativo havas "kunmetitan" kaj "simplan" formon. La "kunmetita" superlativo formiĝas per "**самый**" ['samıj] = "**plej**". Ĉi tiu helpvorto mem estas adjektivo kaj uzas la samajn finaĵojn kaj fleksiojn. Kelkfoje uziĝas ankaŭ la vorto "**наиболее**" [naji'boljije].

La adjektivoj mem havas post la komparacia morfo siajn normalajn finaĵojn.

pozitivo	komparativo	superlativo
старый ['starıj] "maljuna"	**более** старый	**самый** старый

Kompreneble tiu ĉi formo estas pli agrabla por turko, ĉar ĝi korespondas al ties sistemo. La adjektivo mem tamen restas en la pozitiva formo, uzante la samajn finaĵojn kaj fleksiojn. Tial la lingvoproduktado estas ebla kaj oni povas komprenigi sin. La lingvokomprenado siaflanke ankaŭ dependas de la toleremo kaj lingvouzo de la indiĝena lingvano (ne nur de la rusa).

La "kunmetita" superlativo

Per uzo de la komparativo kun postmetita genitivo ankaŭ la superlativo estas esprimebla.

Маша – красив**ее** вс**ех**. = Maŝa estas **la plej** bela **el** ĉiuj.

Tio validas ankaŭ por objektoj:

Маленький дом – красив**ее** вс**ех**. = La malgranda domo estas **la plej** bela **el** ĉiuj.

Мир – важн**ее** вс**его**. = Paco estas **la plej** grava (**de** ĉio).

La "simpla" komparativo

La priskribo "simpla" ĉi tie ne signifas morfologian facilecon, sed kvazaŭ "unuvortecon". Tio estas alia maniero aludi la fleksian karakteron de la formo.

Tamen, pro tio ke la "simpla" komparacio estas uzata plejparte predikate, ĝi havas malpli da finaĵoj: **-ee**, (popollingve ankaŭ – **ей**), **-e**, **-ше** (3-4).

Катя – красивая девушка, а Маша – красив**ее**.
Katja estas bela knabino, sed Maŝa estas **pli** bela.

Depende de la stemkonsonanto de la adjektivo okazas konsonantŝanĝo (6):

г [g]	>	ж [ĵ]	ст [st]	>	щ [ŝĉ]
к [k]	>	ч [ĉ]	д [d]	>	ж [ĵ]
х [ĥ]	>	ш [ŝ]	т [t]	>	ч [ĉ]

Ankaŭ ĉe la komparacio la akcento emas migri, precipe ĉe dusilabaj adjektivoj, de la unua al la dua silabo, ekz.:

сильный / силён ['siljnıj/sil'jon] = "forta" > силь'нее/силь'ней (1)

Kontraŭsistemaj formoj, kiel kutime, troviĝas inter la plej oftaj rusaj adjektivoj (4):

pozitivo	komparativo
хороший / хорош = "bona"	лучший / лучше
маленький / малый = "malgranda"	меньше = "pli malgranda"
старый / стар = "maljuna"	старший / старше
плохой / худой = "malbona"	хуже

La konjunkcion **ol** la rusa esprimas per **чем**.

Маша – красив**ее чем** Катя. = Maŝa estas **pli** bela **ol** Katja.

Same eblas uzi la genitivon: Маша – красив**ее** Кат**и**.

La tielnomata "simpla" superlativo postulas la finaĵojn **–ейший** aŭ **–айший**, kiuj aldoniĝas al la adjektiva stemo. La elekto dependas de la finkonsonanto de la adjektiva stemo kaj necesigas ŝanĝon de la konsonanto:

г > ж + **–айший** = **– жайший** ['ĵajŝij]
к > ч + **–айший** = **– чайший** ['ĉajŝij]
х > ш + **–айший** = **– шайший** ['ŝajŝij]

Ĉi tiuj formoj prefere uziĝas en la literatura lingvo kaj preskaŭ nur atribute. La uzado ankaŭ estas plej ofte elativa (vidu tie). La tielnomata "simpla" superlativo do postulas du variantojn kaj tri konsonantŝanĝojn. (5 elementoj)

Por lerni la rusan komparacion bezoniĝas 8 bazaj elementoj, almenaŭ 4 kontraŭ-sistemaj kaj 10 subsistemaj elementoj (konsonantŝanĝojn). Krome la rusa uzas du komparaciajn sistemojn. Ĉe ĉiuj formoj la adjektivo havas siajn kutimajn finaĵojn (laŭ genro / nombro / kazo), kune 12. 3 formoj postulas la genitivon. La tipa problemo de la rusa, la akcentmigrado, ankaŭ ci tie efikas. (38 elementoj).

Fontoj

Pfaffen: Langenscheidts Praktisches Lehrbuch Russisch, Langenscheidt, Berlin/München, 1960/1980

Potapowa: Sprachkursus Russisch, Langescheidt, Berlin/München, 1965/1967

Antaŭ ol transiri al la negativa komparacio, la elativo kaj la ekscesivo, ni bilancu la ĝisnunajn rezultojn por la adjektiva komparacio. La enrangigo de la ses lingvoj laŭ la plej malgranda nombro da lernendaĵoj por ekregi la adjektivan komparacion sen konsidero de la egaleca kaj negativa komparacioj, la elativo kaj la ekscesivo estas:

1. Esperanto
2. Hispana
3. Germana
4. Franca
5. Angla
6. Rusa

(daŭrigota)

<g.tucker@gmx.de>
Aŭtora adreso kaj priaŭtora informo en SR 3/2009, p.182

Legantoleteroj

Scienca Revuo tre taŭgas por grup-abonoj

Hodiaŭ mi ŝatas paroli al vi pri valora sed malmulte legata gazeto esperantlingva. Ĝi estas la organo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), kaj nomiĝas "Scienca Revuo". Nur 200 ekzempleroj presatas, kaj ĝi valoras legati de multe pli da homoj. La problemo estas, ke ĝi enhavas nur prisciencajn artikolojn, kaj tial ĉiu unuopa abonanto komprene legas nur du, tri aŭ kvar artikolojn el la kutima nombro de naŭ aŭ dek. Tio dependas, pri kiuj sciencoj vi havas bazan aŭ pli profundan konon. Pri la aliaj sciencaĵoj oni kutime ne havas sufiĉan konon por kompreni la enhavon. Tial **la gazeto tre taŭgas por grup-abonoj**. Ĉar el la grupanoj kutime trovas kelkajn artikolojn, kiuj lin aŭ ŝin interesas.

Kiel ekzemplon mi donas la enhavon de unu gazeto:

1. La konkerado de Marso. Ĉi tiu artikolo donas multajn historiajn informojn pri la kono ante la planedon Marso. Ĉiuj legantoj komprenos ĝin, sed por kelkaj legantoj ĝi donas ankaŭ multajn informojn, kiuj ne interesas ilin.
2. Teĥnologia potencialo de kelkaj specoj de tritiko. Ĉi tiu artikolo estas tiom scienca, ke ĝi interesas nur fakulojn.
3. Neordinara seksa siteno de algoj el la insulo Japo. Ĝi estas komprenebla al ĉiuj.
4. Ekonomio de la produktado. Nur akademiaj spertuloj pri ekonomio komprenos ĉi tiun artikolon.
5. La nocio de la bela naturo en la estetiko de klasikismo. Ĉi tiu artikolo traktas specialan temon en literaturo, legeblan de ĉiuj.
6. Sanoaspektoj dum vojaĝoj en forajn landojn. Kvankam tre detala kaj informplena, ĉi tiu artikolo tre utilos al ĉiuj vojaĝantoj en fremdaj landoj.
7. La vojoj de pilgrimado en Oriento. Temas pri interesa aspekto simila en diversaj artoj. La artikolo kompreniĝas facile.

De tempo al tempo troviĝas sciencaj artikoloj **pri** Esperanto.

Krom ĉi tiuj originale en Esperanto verkitaj artikoloj de sciencistoj, troviĝas en la gazeto ankaŭ rubriko pri terminologio, rubriko de letero de legantoj, kaj kelkajn paĝojn kun informoj pri sciencaj interesaĵoj tradukitaj el ne-esperantistaj gazetoj. Ĉiuj tiuj artikoletoj estas interesaj kaj facile kompreneblaj.

Do, ĉiu esperantisto trovos ion interesan, aŭ multon interesan, en la revuo. Mi esperas do, ke ĉiuj kluboj en Aŭstralio abonos ĝin, por pli-